Daraufhin konnte man in einem Leserbrief des Grazer Journalisten Heinz-Paul Kovacic erfahren: „Der Grazer Schriftsteller Clemens J. Setz ist nicht nur einer der wichtigsten deutschsprachigen Autoren der Gegenwart, wofür er nun mit dem Büchner-Preis ausgezeichnet wurde. Sein jüngstes Buch "Die Bienen und das Unsichtbare" ist überraschenderweise kein Roman, sondern ein Sachbuch, in dem er über den Tellerrand der herkömmlichen Sprachen hinausschaut und Plansprachen wie Esperanto, Volapük oder Talossa übersichtlich und kritisch betrachtet. Setz meint, noch nie wurde bei einer Plansprache so viel "richtig" gemacht wie im Fall Esperanto, in dem wie in allen lebensfähigen Sprachen eine sinnlich und strukturell verkörperte Unendlichkeit steckt.“

Und sein Fazit war: **Für Clemens J. Setz ist Esperanto die große Befreiung.**

Utho Maier

Retletere rondsendita alvoko de nia prezidanto Ulrich Brandenburg:

Karaj geamikoj,

kiel multaj el vi scias, niaj geamikoj Wolfgang kaj Ilona Bohr fariĝis viktimoj de la inundo en la regiono Ahrweiler. Ili povis savi sin mem, sed ilia domo estas parte ne plu uzebla kaj multaj havaĵoj perditaj. Intertempe ili estas denove atingeblaj almenaŭ per poŝtelefono kaj okupiĝas pri ordigado.

Pluraj organizoj intertempe kolektas mondonacojn por helpi al la viktimoj. En la pasintaj tagoj mi ankaŭ ricevis demandojn de esperantistoj, ĉu kaj kiel eblas rekte subteni Wolfgang kaj Ilona. Tial mi cirkuligas al vi la ĉi-suban informon de la filino Lara. Temas pri privata iniciato de la familianoj.

Amikajn salutojn
Ulrich Brandenburg

Sehr geehrter Herr Brandenburg,

Von meinem Vater, Wolfgang Bohr, habe ich heute erfahren, dass Sie Interesse geäußert haben meine Eltern nach dem Hochwasser in Ahrweiler zu unterstützen. Dafür danke ich Ihnen herzlich im Voraus und sende gerne den Link zum Paypal-Spendenaufruf:

https://paypal.me/pools/c/8BE4Z56n2R

Gerne können Sie diesen Link natürlich an Personen weiterleiten, welche meinen Eltern auf dieser Weise helfen möchten.

Bei Rückfragen stehe ich Ihnen gerne zu Verfügung.
Mit freundlichen Grüßen

Lara Bohr

Feier 15 Jahre "Herzberg am Harz... die Esperanto-Stadt" im Esperanto-Garten

Im Juli 2006 hatte der Stadtrat der Südharzstadt Herzberg beschlossen, der Stadt für div. Zwecke den Beinamen "Herzberg am Harz...die Esperanto-Stadt bzw. in Esperanto "Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo" zu geben.

Das ist sogar weltweit gesehen wirklich einzigartig. Das ist ein richtiger Schritt für Esperanto in die "natürliche Umwelt". U.a. wurden verschiedene größere Kongresse, z.B. für Eisenbahner, Lehrer und der Deutsche Esperanto-Kongress hier ausgerichtet. Die meisten Wegweiser in Herzberg sind inzwischen zweisprachig, z.B. Bahnhof - stacidomo, Rathaus - urbodomo, Bücherei - biblioteko, Amtsgericht - juĝejo, Polizei - policejo, usw. Auch viele Bäume um den schönen Juessee herum etc. haben Informationstafeln auf Deutsch, Esperanto und Latein.

Jetzt wurde das fünfzehnjährige Jubiläum dieses besonderen Ereignisses im Esperanto-Garten des Centros gefeiert. Trotz schlechter Wetterprognose hatte am 11.07.2021 doch die Sonne die Oberhand gewonnen. Ca. dreißig Mitglieder und Gäste freuten sich über diesen besonderen Moment. U.a. gab es Kesselgulasch, veganes Essen, Geburtstagstorten. Es wurde viel über das Vereinsjahr 2020 berichtet, aber auch Gespräche unterschiedlicher Art kamen nicht zu kurz. Es wurde auch viel gelacht. Fast alle Teilnehmer möchten nächstes Jahr gern wieder dabei sein. Im Rahmen der EGS-Jahreshauptversammlung wurden die Vorstandsmitglieder wiedergewählt. Als Kassenprüfer wurden Martin Ptasinski, Helga Vogelsang und erstmals Maria Birkefeld gewählt.

Man ist stolz, viel für die einzigartige neutrale Zweitsprache sowohl für Esperanto als auch für Herzberg am Harz...die Esperanto-Stadt gestaltet und erreicht zu haben. Besuchen Sie diese besondere Stadt; denn hier gibt es noch viele weitere interessante Punkte, z.B. den Zamenhof-Platz mit dem einzigartigen Zamenhof-Denkmal und der ständigen Esperanto-Flagge. Es gibt viele Überraschungen, wie einen sog. Esperanto-Bänkerundweg. Ein zweisprachiger "Esperanto-Wanderweg" mit einer eigenen Stempelkarte und vielen esperantobezüglichen Haltepunkten ist in Bearbeitung. Wer es graphisch noch verbessern und verschönern will, kann sich dankenswerterweise gern bei uns melden. Im Museum des Welfenschlosses werden regelmäßig interessante Fachausstellungen zum Teil mit Objekten aus aller Welt ausgestellt. In der Stadtbücherei gibt es eine lange Wand mit Büchern in Esperanto.

Das Esperanto-Zentrum hilft seit ca. fünfzehn Jahren auch bei der praktischen Ausgestaltung der Städtepartnerschaftsarbeit mit der polnischen Partnerstadt Góra. Dort gibt es auch einen aktiven Esperanto-Klub. Die Bibliothek des Herzberger Esperanto-Zentrums mit ca. vierzehntausend verschiedenen Titeln gehört inzwischen zu den größten Sammlungen weltweit; das Archiv mit vielfältigen Sammlungsbereichen ist auf vielen Gebieten gar einzigartig, dank jahrzehntelanger aktiver Sammler- und weltweiter Tauschaktivitäten.

Erfolgreiche Sitzungen der Organe der Stiftung Esperanto-Stadt Herzberg

Am letzten Sonntag fand im Sitzungssaal des Herzberger Rathauses die Sitzung des Vorstandes der Stiftung statt. Mitglieder des Stiftungsvorstandes sind Harald Mantz, Otto Kern, Brian Moon aus Luxemburg sowie Dirk Brömme. Die Sitzung wurde durch den Vorsitzenden der Stiftung Bürgermeister Lutz Peters geleitet.

Der Vorstand tagte in Präsenzform. Ferner war der Vorsitzende des Kuratoriums Andreas Emmerich, der auch der Vizepräsident des Deutschen Esperanto-Bundes ist, persönlich anwesend. Weitere Kuratoriumsmitglieder, z.B. der stellvertretende Vorsitzende Gerhard Walter und Aktive des Herzberger Esperanto-Zentrums, usw. waren in virtueller Form für die Sitzung des Kuratoriums zugeschaltet worden. Diese Herzberger Spezialstiftung existiert bereits seit elf Jahren. Im letzten Jahr konnte wegen der Epidemie das zehnjährige Jubiläum der Stiftung leider nicht gefeiert werden.

Als erfreulich wurde gewertet, dass im Laufe der Jahre dank diverser Zustiftungsbeträge die angesparte Kapitaleinlage der Stiftung Esperanto-Stadt Herzberg um eine beachtliche Summe erhöht werden konnte.

Wegen der momentan niedrigen Zinserträge können aber nur geringe Beträge als Zuschüsse für zweisprachige Beschilderungen und Informationsflugblätter durch den Vorstand der Stiftung bewilligt werden. Das Hauptziel, z.B. ein Herzberger Esperanto-Haus bzw. eine Esperanto-Bibliothek oder gar ein Esperanto-Museum, liegt noch etwas in der Ferne.

Von dem Herzberger Esperanto-Zentrum wurde erfreulicherweise berichtet, dass die Bibliothek - einschl. reichhaltiger Zeitschriftensammlungen - inzwischen zu den größten Sammlungen in der Welt gehört. Die einzigartigen Archivmaterialien mit einer breiten Palette von Sammlungsthemen bilden wohl sogar das vielfältigste Esperanto-Archiv in der Welt dank jahrzehntelanger Sammlungsaktivitäten. Zu den Kulturobjekten gehören viele Raritäten und Frühdrucke.

Eine geeignete öffentlich zugängliche Einrichtung, wie ein Esperanto-Museum, sollte ein sinnvolles Ziel der Stiftung Esperanto-Stadt Herzberg sein.

Celoj de la Fondaĵo Esperanto-Urbo Herzberg

finance subvencii kulturajn, interkulturajn kaj internaciajn agadojn por interpopola komunikado en aŭ ligo al la Esperanto-urbo Herzberg, por efike kaj daŭre subtenadi la internacian lingvon Esperanto, i.a. per

- starigo de publika Esperanto-renkontiĝejo kun aldona biblioteko
- informado pri Esperanto kaj pri la Esperanto-urbo Herzberg
- subtenado de ĝemelurbaj kontaktoj
- evoluigo de la instruado de la lingvo kaj pretigo de kvalifikitaj Esperanto-instruistoj
- interŝanĝo de lernejaj grupoj, i. a. surbaze de eŭropuniaj programoj
- plibonigo de la Esperanto-infrastrukturo en Herzberg
- subtenado de kulturprojektoj en Herzberg kaj starigo de internaciaj fakaj kontaktoj favore al Esperanto kaj la urbo.

La Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg

Adreso
Stiftung Esperanto-Stadt Herzberg
Marktplatz 30
37412 Herzberg am Harz

Estraro
Prezidanto: urbestro Gerhard Walter
Membroj: Dirk Brömme, Otto Kern, Harald Mantz, Brian Moon (Luksemburgio)

Subteno
La celoj kaj la laboro de la Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg estas subtenataj de la kuratoraro de la fondaĵo kaj de la urbo Herzberg.

Ŝtate kontrolata
La fondaĵo estas ŝtate kontrolata laŭ la leĝoj validaj por la fondaĵo.

Banko: Volksbank im Harz eG
BLZ: 26891484 Kontonummer: 1111100300
IBAN: DE89 26891484 1111100300
BIC: GENODEF1OHA

Fondaĵo Esperanto-urbo Herzberg

Ŝanco por Esperanto

www.herzberg.de
www.esperanto-urbo.de

Kastelo kun la urba muzeo kun Esperanto-fako

Alvoko por estonta kunkreado rilate Esperanto-servojn en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo

Ni tre ĝojas, ke nia Esperanto-Centro povis kaj povas plenumi multajn kulturtaskojn je favoro por Esperanto. Grandparte la servoj estas videblaj kaj funkcias en la publika medio.

Jen ni ne volas prezenti al vi longan kaj veran Esperanto-servoliston. Se vi volas viziti nin kaj nian regionon, bv. kontakti nin, eble por interkonsento de taŭga dato, se vi deziras pli detalajn informojn. Simple ni esperas kaj kredas, ke ekzistas helpemaj kaj kapablaj homoj kun interesaj motivoj je favoro por Esperanto. Taskoj multas, ekzemple por niaj bibliotekoj, arkivoj, varbado, novkreadoj, ktp. Se vi povos veni – kiel honorofica helpanto, resp. kreanto – ekzemple en septembro 2021, bv. kontakti Peter Zilvar (*rete: esperanto-zentrum@web.de*).

Eble ni povos pagi la vojaĝkostojn kaj poŝmonon. Eta loĝejo estos disponebla. Bonvolu kontakti nin.

Samideane salutas je nomo de la Espernato-Centro
Peter Zilvar

PS: Se iuj eĉ volas longtempe kunhelpadi kaj ĝoje kunkreadi, tio estus granda paŝo antaŭen! Do, ni esperas.

Somera florado en la Esperanto-ĝardeno

Ĝuste okaze de la dekkvinjara jubileo de la akiro de la oficiala titolo "Herzberg am Harz... la Esperanto-urbo" (11.07.2021) ni havis belan memorfeston, kune kun nia jarĉefkunsido kaj kune kun abunda ĝardenfesto. La membroj kaj gastoj ĝojis pri la multaj floroj.

Aparte ni ĝojis pri la bela ruĝkolora florado de la "Grimprozo Zamenhof" en la Esperanto-Ĝardeno de la Esperanto-Centro (ICH). La rozuja kadro stabiligis la unikan, nepre konservindan grandfloron. Antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj ni sukcesis akiri ĝin per aŭkcia firmao en Ĉeĥio.

Greftinto de tiu ĉi rozspecio kun la fama nomo "Rozo Zamenhof" estis d-ro Gustav Brada el Bohemio. Post sukcesa eksperimentado en la jaro 1932 li donis al la nova rozospecio la nomon "Rozo Zamenhof". Tio estas unika vivanta belaspekta varbilo. D-ro Brada i.a. estis posedanto de sukerfabriko kaj dum multaj jaroj aktivis libertempe kiel "rozgreftisto". Por honorigi la faman inventiston de la neŭtrala kaj packrea lingvo Esperanto, nepre sukcesa kreado de aparte bela rozujo ricevis tiun ĉi faman nomon. Ofte esperantistoj ne scias multe pri la eksterordinare riĉa kaj multforma historio de la Esperanto-kulturo.

Tiu ĉi rozo estas vere rara. Krom en la Esperanto-urbo Herzberg en la katalogo de la plej granda rozoparko "Europa-Rosarium" en Sangerhausen (Saksio-Anhaltio) almenaŭ oni trovas pluan ekzempleron.

En la Esperanto-ĝardeno i.a. troviĝas ankaŭ du variantoj de la t.n. Esperanto-klematito kaj la belega "Rozo de la Espero". Tiu ĉi rozo eĉ kapablas ŝanĝi la kolortonojn inter la flava kaj rozkolora.

Post la malalttemperatura vintro ĝi tamen ekkreskis en majo kaj komence de julio abunde floradis.

Plua "Rozo de la Espero" floras en la korto de la urbodomo en Herzberg. Tie ŝildeto memorigas pri la plantado fare de la du urbestroj de la ĝemelurboj Herzberg kaj Gora/PL en la jaro 2016, okaze de la dekjara jubileo "Herzberg am Harz... – la Esperanto-urbo".

En la Esperanto-ĝardeno (ekzemple krom multaj agavoj kaj bedo de vintroduraj kaktoj) troviĝas multaj floroj kaj plantoj, ofte kun dulingvaj ŝildetoj.

Bonvenon en la vivanta Esperanto-kulturtereno!

ICH Herzberg am Harz … die Esperanto Stadt - Terminkalender

01.10.– 03.10.21 TORPEDO, AGEI & GEA-Weiter-bildungswochenende u.a. mit einer großen Besuchsdelegation aus Polen (EU-Projekt K1)

30.10.21 14:30 JHV 2021 des Deutschen Esperanto-Bundes in Herzberg bzw. Osterode

Ab Okt. 2021 Teilnahme an einem EU-Projekt „Erasmus+“, Leitung in Toulouse/Frankreich

12.11.21 – 14.11.21 Esperanto-Wochenendkursus im Esperanto-Centro (ICH)

10.12.21 – 12.12.21 DEB-Weiterbildungsseminar, Zamenhof- & Weihnachtsfeier am 11.12.21

De Aŭstrio al Bratislavo en pandemia tempo

Rakonto pri la vojaĝo al Bratislavo 2021-07-07.

La 7-a de julio estis la unua merkredo de la monato. Antaŭ la pandemio okazis ĉiam je la unua merkredo monate Lingva Kafejo en Bratislavo. Pro la pandemio tiuj kunvenoj estis nuligitaj.

Ekde kelkaj tagoj nun denove eblas alveturi Slovakion.

Kiam mi jam estis en trajno, venis mesaĝo de unu esperantistino el Bratislavo.

Alfréd, ĉu vi povos veni al lingvokafejo? Oni ree faras obstrukcojn. Sur hungaraj kaj moraviaj limoj estas betonaj blokoj eĉ!!! Frenezulejo.

Mia respondo:

Ho. Mi estas survoje kaj jam en Slovakio nun.

Antaŭ Bratislavo estas nur unu haltejo. Ĝi nomiĝas Devínska Nová Ves. Tie eniris dekduo da uniformitaj personoj, pri kio mi nun ne miris. Kelkaj estis nigre vestitaj, kelkaj blanke, sed plejmulto havis verde-brunan soldatan kostumon kun nigra bendo surbrake: "Policia".

Mi bedaŭris, ke mi ne komprenas la slovakan lingvon. Tiuj homoj nek komprenis la anglan, nek germanan, nek Esperantan lingvojn. Mi montris mian pasporton kaj Verdan Vakcinan Pasporton en mobiltelefono kaj ili kontentiĝis kun "Okay".

Baldaŭ poste la trajno atingis Bratislavon. Mi nun promenis de la stacidomo al la centro. Mi jam pli-malpli konis la vojon, tamen mi ĝojis, ke la navigilo en mia poŝtelefono en dubaj kazoj montris la ĝustan direkton. Umelka nomiĝis mia celo. Granda restoraĉio ĝi estas. Post duonhora promeno

mi atingis ĝin. Mi estis frue tie, kiel la plej unua inter ni esperantistoj. Duonhoron poste alvenis Maria kun Eva, poste Iwan, poste Arnold, poste Darinka.

Ni interŝanĝis niajn opiniojn pri la pandemio. Kelkaj estas vakcinitaj, kelkaj tute rifuzas pensojn pri vakcinado. Do, la sama opini-vasteco kiel inter miaj ne-esperantistaj konatoj. Ni rakontis pri niaj familianoj kaj komunaj amikoj, pri la nuna stato de renkontiĝoj. Mi transdonis kelkajn ekzemplerojn de „Esperanto aktuell“ kaj unu ekzempleron de „La Fido“ de Vinko Oŝlak.

Tempo rapide forflugis. Tri horojn post mia alveno mi jam devis forlasi la kunvenon, por atingi unu el la lastaj trajnoj hejmen. La posta kaj samtempe lasta trajno tiutage estus veturinta nur du horojn poste.

Dum la veturado de Slovakio al Aŭstrio estis neniaj Koronvirus-rilataj kontroloj. Mi jam antaŭĝojas pri la venonta restado en Bratislavo. Se vi intencas veturi la saman itineron, atentu, ke la reguloj por eniri Slovakion povas ŝanĝiĝi. Vidu: *https://www.bmeia.gv.at/reise-aufenthalt/reiseinformation/land/slowakei*

2021-07-11, **Alfred Heiligenbrunner**

Matura (Abitur) plus Esperanto in Wien!

Diese einmalige Kombination wurde im Juni realisiert und zwar von dem den Lesern schon bekannten Felix Baur, der sich Anfang Dezember 2020 an den Österreichischen Esperanto-Verband (AEF) wandte um Informationen über Esperanto für seinen „History Club“ am Wiedner Gymnasium und der Sir Karl Popper Schule zu erhalten.

Ein halbes Jahr später hat er seine Maturaprüfung mit ausgezeichnetem Erfolg bestanden, sich parallel dazu aber engagiert mit Esperanto befasst, es mit ebenfalls ausgezeichneten Erfolg erlernt und in seiner Korrespondenz mit AEF verwendet. Dabei hat er für den History Club zwei Videokonferenzen über Esperanto organisiert, eine davon mit dem Teamleiter des Internationalen Esperanto-Museums Wien der Österreichischen Nationalbibliothek, Mag. Bernhard Tuider.

Aus diesem Anlass haben wir ihn am 15.6. zum Mittagessen beim E-Museum eingeladen und anschließend uns im Museum eingefunden, um dort seine Pläne nach der Matura zu erfahren. Geplant ist, dass er ab Herbst als Freiwilliger über den „Verein Gedenkdienst“ einen einjährigen Gedenkdienst in London leisten wird. Einen ausführlichen Bericht über seinen Werdegang mit Esperanto möchte er für die nächste Ausgabe von Esperanto aktuell verfassen.

Ni gratulas al nia nova kaj sukcesega samideano Felikso kaj deziras ĉion bonan por la tempo post la gimnazio! Pormemore ni aldonas foton (aŭtorino: Stella) pri la vizito en la Esperanto-Muzeo, kie li kun mag. Tuider renkontiĝas (pandemie maskitaj, evidente!)

Nome de AEF: **Stella kaj Hans Michael Maitzen**
(2021-07-14)

Rakonto pri unu vivo, komenciĝinta antaŭ cent jaroj – „Dio estas Amo“

Inĝeniero Karl Reinisch naskiĝis 13.8.1921 en Sankta Osvaldo apud Plankenwarth, proksime de Graz, kiel la 15-a kaj la plej juna infano sur farmbieno.

La patro mortis, kiam li estis sepjara. La paroĥestro proponis, ke li fariĝu pastro. Tial li ekloĝis ĉe sia onklo Johann en Eggenberg apud Graz. Li fariĝis lernanto en la Akademia Gimnazio en Graz. Post kvar jaroj li konsciiĝis, ke li ne pastriĝos. Tial li ŝanĝis la studadon al Teknika Supera Lernejo (HTL) en Gösting apud Graz. Li lernis konstruadon de radioaparatoj kaj poste riparis televidilojn.

En la dua mondmilito li devis pasigi ekzamenon por fariĝi ano de personaro de militista aviadilo. Intence li malsukcesis en tiu ekzameno. Tial li kun kolegoj devis kontroli la aerospacon super Danlando. Tiu agado estis ekstreme teda. Tial multaj kolegoj proponis sin por la orienta fronto, kie plej multaj pereis.

Post la milito li kontinuis sian edukadon en teknika supera lernejo en Graz. Intertempe li enamiĝis al filino de la najbara korto Käthe (Katharina). Ignorita influenco kondukis al difekto de la korklapo. Post abituriĝo li eklaboris je la Aŭstria Administracio por Poŝto kaj Telegrafio, departemento por radio, radiofonio kaj radioamatoroj en Graz. Finfine en 1949 li edziĝis al Käthe.

En 1950 naskiĝis la unua infano, Maria. Multtalente ŝi lernis facile kaj rapide. En 1952 sekvis knabo, Karl. En la aĝo

de ses jaroj evidentiĝis lia malbonaŭdeco. Du operacioj je orelo ne rezultis la bezonatan sukceson. En 1954 naskiĝis plia knabo, Wolfgang. En 1956 la kuracisto ne ekkonis, ke la bebo kuŝas malĝuste en la patrina korpo. Naskiĝante, la bebo estis kelkajn sekundojn sen oksigeno. Tial Dorothea (Dorli) fariĝis handikapulino.

Ĉiujare aŭguste oni veturis aŭtobuse por tri semajnoj al stiriaj alpoj. Ĉiutage migradi, kantante, ludante, oni pasigis tre belan kaj ĝojan tempon. Dorli ekfrekventis specialan lernejon por handikapuloj. La patrino ekkonis neceson pri plia subteno al la infano. Sed neniaj eblecoj tiutempe videblis. Do la patrino ĉiutage post la lernejo lernis kun ŝi, ĝis kiam ambaŭ ekploris pro laciĝo. El tiu senlaca, obstina lernado rezultis, ke Dorli povis perlabori sian vivtenon kiel helpantino en lavejo kaj poste en hejmo por pliaĝuloj. Ŝi povis ankaŭ sendepende vojaĝi en forpermesoj en Stirio. Kiam ŝi subite mortis pro krevinta sangovazo, la pliaĝuloj funebris.

Dum la pubereco la talenta, saĝa filino Maria psike malsaniĝis. Ŝi devis forlasi la gimnazion kaj ricevis intensajn tablojdojn. Plurfoje ŝi pasigis tempojn en speciala malsanulejo. Laborante en granda entrepreno ŝi suferis plurfoje je psikoteroro. Finfine trovinte novan laboron kiel telefonistino ŝi bonfartis. Ŝi konatiĝis kun amiko. Je bela antaŭprintempa tago ŝi ne biciklis al la laborejo, sed al nubskrapulo. Tie ŝi trovis la solan malferman fenestron kaj falis.

Tuj post la okupado de Aŭstrio la nazioj okazigis traserĉon en la domo kaj la korto de la posta edzino Käthe. Kiel 18-jaraĝa knabino ŝi tremante sidis sur kesto por lignoj, kies enhavo estis la dokumentoj de la rezistanco. En tiu danĝero ŝi votis al dipatrino Maria, ke ŝia unua infano nomiĝos Maria, kiel okazis. Käthe estis la unusola knabino en la ĉirkaŭaĵo, kiu ne membriĝis en BDM, la nazia ligo de germana knabinoj. En la milita tempo ŝi laboris ĉe ĉarpentisto kaj hejme en la malgranda transporta entrepreno kun ĉevaloj. Komence de la 70-aj jaroj oni intencis konstrui aŭtoŝoseon (Autobahn) tra Eggenberg (intertempe parto de Graz). Ĉiuj indigniĝis. Käthe analizis tiun indigniĝon, proponinte fondon de la unua civitana iniciato de Aŭstrio. La urbestro devis demisii kaj la aŭtoŝoseo estis konstruita tra la tunelo de Plabutsch.

Inĝeniero Karl Reinisch estas kara edzo kaj patro. Ĉiutage li revenis je la 15-a horo de la oficejo. Kun la edzino li prenis malfruan tagmanĝon kaj priparolis la aktualaĵojn. Post tio li riparis en sia riparejo por parencoj kaj konatuloj la diversajn elektrajn aparatojn, plej ofte radioaparatojn kaj televidilojn. Sabate li riparis en la domo, la korto kaj la ĝardeno, aŭ en la preĝejo kaj paroĥejo, kiu estis riparenda. Li estis membro de Konferenco de Sankta Vincento kaj de la paroĥa konsilantaro. La dimanĉo apartenis al la familio kaj al la infanoj. Post la diservo kaj la tagmanĝo oni migris kaj ludis, plej ofte sur la monto Plabutsch je la urborando. Festojn oni festadis, tio estis grava afero. Post la morto de Maria li multon pridemandis kaj trovis novajn ĝojon kaj amikojn. Je operacio de korklapo oni disponis pri artefarita korklapo nur en malĝusta grandeco kaj enmetis tion. En la oficejo li estis kiel vicestro, la pledanto por siaj gekolegoj. Kiam li mem fariĝis departementestro, li devis antaŭtempe pensiiĝi pro malbona sanstato. Li tre amis sian edzinon Käthe. Granda ĝojo por li estis la katolika movado Cursillo kaj „La movado por pli bona mondo“. Ĉar lia koro ĉiam pligrandiĝis kaj formovis aliajn organojn kiel pulmo, li denove devis operaciiĝi por ricevi novan korklapon. Dum la operacio 24.7.1986 li forpasis en la aĝo de 65 jaroj.

Malgraŭ la multaj sortobatoj, li en la lastaj jaroj ĉiam ripetis: „Dio estas Amo“. Tiuj konfido kaj fido estas lia testamento.

(2021-07-14, **Karl Reinisch**)

Malnovaĵoj de GEJ – Letero de Trude Sinno

Dum reta seminario pri la historio de la Germana Esperanto-Junularo, kiu okazis pasintnovembre, ni petis eksajn membrojn rakonti pri siaj iamaj spertoj en GEJ kaj eble eĉ sendi al ni materialojn montrantajn, kiel ili, ankoraŭ junaj, aktivis kaj agadis en Esperantujo. Do ni ege ĝojis pri la jena letero de Trude Sinno, en kiu ŝi tre vive kaj detale rakontas pri siaj Esperantaj travivaĵoj. Sed legu mem! Ĉio ĉi daŭre aperas kiel parto de nia nun jam regula serio "Malnovaĵoj de GEJ", kieskadre ni ŝatus prilumi interesajn pecojn kaj pecetojn el la historio de nia organizo, okaze de la ĉi-jara 70-jara jubileo.

La kune-redakcio, Bonn, 2020-11-22

Karaj [...],

dankon pro via informo pri la baldaŭa 70-jara GEJ-jubileo. Estas tiom longa tempo! Bedaŭrinde mi ne plu havas malnovajn gazetojn, sed povas nur mallonge raporti pri mia iama kontakto kun Esperanto. Mi konatiĝis kun Esperanto iomete pli poste, meze de la 50-aj jaroj. En tiu tempo ekzistis lerneja jara kalendaro, en kiu GEJ reklamis. Sed Esperanto-parolantojn mi unuafoje renkontis surŝipe inter Helsinki kaj Travemünde en la jaro 1958. Sur tiu kargoŝipo estis dano kaj irlandanino, kiuj komunikis en Esperanto, lingvo, kiun mi ĝis tiam neniam aŭdis. Ili ĵus revenis de internacia kongreso en Moskvo, kie samtempe ankaŭ okazis Esperanto-renkontiĝo. Kompreneble mi tuj demandis ilin, kiamaniere oni povas lerni la lingvon. Iom poste la dano (kies nomon mi forgesis) sendis al mi adreson de esperantisto en Würzburg (kie mi tiam loĝis) kaj nomon de la tiam plej konata lernolibro en Germanio de W+H Wingen: „Wir lernen Esperanto", eldonita en Limburg.

Fininte la 12 lecionojn, mi jam bone povis komuniki kaj komencis korespondi kaj kontakti la lokajn esperantistojn. Malbone por via arkivo – mi tro ofte translokiĝis kaj ne plu havas arkivon el la unuaj jaroj, sed ek de tiam Esperanto estas parto de mia vivo, ĉu en Aŭgsburgo, aŭ poste en Leverkusen, kie – en 1959 – mi fariĝis sekretariino de GEJ, kies du aliajn estraranojn ĉiuj el vi pli bone konas: U. J. Moritz kaj U. Lins.

Favore por mi estis, ke mi havis personajn leterajn kontaktojn kun ĉiuj aliĝintoj al niaj multaj renkontiĝoj (paska, pentekosta, finjara ...). Vojaĝoj tiutempe por multaj ne estis tiel facilaj kiel hodiaŭ. Kompreneble ĉiam venis niaj najbaroj el NL, B, F, sed el GDR ekz. ankoraŭ ne eblis. Por gastoj el Pollando, (Eks-)Jugoslavio, Hungario ktp. ni povis faciligi enirvizojn. Same vizitoj el Hispanio tiutempe ankoraŭ maloftis. Ni ĉiam havis buntan internacian rondon. Speciale mi memoras gaston el Madagaskaro – tiel fora. Tiutempe el Anglujo venis H. Tonkin kaj J. Wells (tre konataj intertempe), sed ekz. dum la tiama renkontiĝo en Kolonjo neniu antaŭsciis, ke ili estos famuloj en Esperantujo, same kiel U. Lins intertempe.

En 1964 mi translokiĝis eksterlanden kaj nur pasive uzis la lingvon, restis en kontakto kun nuraj 4-5 esperantistoj.

Nur reveninte al Germanio en 1978 miaj infanoj kaj iliaj geamikoj deziris inventi sekretan lingvon, tiam mi sukcesis

konvinki ilin uzi Esperanton, kiu ja jam ekzistas. Tio estis la komenco de „Esperanto Junularo Burscheid“. Ni fondis la grupon kun subteno de la urbo, rajtis instrui en la „VHS“ kaj ricevis malaltan subvencion por partopreni internaciajn renkontiĝojn, ekz. en B-Lichtaart.

La urbajn rajtojn Burscheid jam ricevis en 1856 kaj festis la 125-an jubileon en 1981. Por tiu okazo nia loka Esperanto-grupo okazigis internacian GEJ-renkontiĝon en Burscheid. El tiu tempo mi ankoraŭ trovis fotojn, kiujn vi vidas.

Post denovaj translokiĝoj mi nun loĝas en Bonn, kie ankaŭ U. Lins estas samurbano. Ni (ekster kronvirusa tempo) regule renkontiĝas 1-foje monate en „Cassius-Garten“. Mi ankoraŭ estas UEA-membro, legas Esperanto-gazetojn, sed estas nuntempe nura pasiva membro.

Bedaŭrinde plion mi ne povas kontribui al la baldaŭa 70-a GEJ-jubilea festo.

Mi deziras al vi sukceson kaj ĉion bonan!
Trude Sinno

PS: Fotoj dum la 125-jarfesto en Burscheid. Esperanto-ekspozicio en la loka Sparkasse, Trixini, migrado en Burscheid (Berg. Land), kaj la devigaj tiutempaj popoldancoj dum Esperanto renkontiĝoj.

La Mortiga Fuĝo tra Spaco kaj Tempo

–Die tödliche Flucht durch Raum und Zeit (Andreas Niethmann & Jeske Beyer, mit Vorwort von Michael)

Ein kleines Vorwort von Michael zur Einordnung:
Am 31. März ging im Mailpostfach des DEB folgende Nachricht ein:

„Hallo zusammen!

In den letzten acht Jahren haben wir eine (zum großen Teil) esperantosprachige fünfteilige B-Movie-Horror-Sci-Fi Serie produziert […]. In diesen Tagen haben wir die letzte Folge ‚Sur la tero' […] fertiggestellt.

Soweit wir recherchiert haben, ist unsere Serie scheinbar die einzige Ihrer (Esperanto-)Art und schon dadurch vielleicht etwas was für Sie und Ihre Mitglieder?

Handgemachte Effekte und Musik gibt es oben drauf!

Herzliche Grüße
Andreas Niethmann"

Nach zwei verwunderten Weiterleitungen über den DEB-Verteiler („Kennt das jemand von Euch?", „Nein, vielleicht was für die Jugend?") kam die frohe Kunde von der exklusiven B-Movie-Horror-Sci-Fi-oder-so-Serie schließlich bei uns, also der DEJ an. Neugierig hab ich (Michael) dann mal eines Abends auf die beigefügten YouTube-Links geklickt und mich von einem wilden Schauspiel aus Retro-Filmästhetik, Special-Effekten alla mamma, grammatikalisch meistens korrektem Esperanto und vor allem faszinierender Verwirrung berieseln lassen. Als ich dann über die Videobeschreibung zum Blog der beiden Hobby-Filmemacher Andreas Niethmann und Jeske Beyer gelangt bin, konnte ich dort nach kurzem Herumstöbern in einigen Beiträgen Anspielungen darauf finden, dass die beiden im Sommer 2014 das SES in der Slowakei besucht hatten, wohl aber so abgeschreckt von ihren dortigen Erlebnissen und Eindrücken der Esperanto-Kultur waren, dass sich ihre anfängliche Begeisterung für die Sprache mittlerweile nach und nach in eine eher sarkastische Distanziertheit gewandelt hatte. Das klang für mich direkt nach einer interessanten Geschichte. Also kontaktierte ich die beiden schließlich und bat sie, für diese Ausgabe der kune über ihre kurze Karriere als Esperanto-Filmemacher und ihre ungefilterte Wahrnehmung von Esperanto und -ujo zu berichten. Dazu waren sie gerne bereit. In diesem Sinne, herzlichen Dank für diesen Gastbeitrag, verfasst von waschechten Kabeintoj!

22. Jahrhundert

„Morris, pafu! Pafu do!" Atemlos versucht Kapitän Chesterfield, seinen Navigator Morris aus dessen Schockstarre zu befreien. Morris, der ebenso wie Kapitän Chesterfield und der Rest der Besatzung der SGW-2249 erst vor wenigen Stunden auf dem unerforschten Wüstenplaneten 3/5/20/9-1/12/16/8/1 V (منخر) gelandet ist, glaubt seinen durch eine Dior-Sonnenbrille geschützten Augen nicht trauen zu können: Eine riesige, wurmartige, dreiäugige Kreatur rast durch die endlosen Sandweiten auf ihn und Kapitän Chesterfield zu. Vor sich her treibt das mit einem riesigen, nach Fleisch gierenden, unterhalb der drei Augen auf- und zuschnappenden Maul jagende Geschöpf eine junge Frau. Wie durch Watte dringen die Rufe von Kapitän Chesterfield in Morris' Bewusstsein. Als Chesterfield schon glaubt, dass Morris nicht mehr schießen wird, richtet dieser seine Strahlenwaffe mit ausgestrecktem Arm auf die Kreatur und schießt …

aus: "Epizodo IV: Sur la Planedo"

Frühling 2014

„Die ersten drei Episoden unserer Serie sind fertig, die vierte Episode ist in Arbeit. Wir fahren zum ‚Somera Esperanto-Studado' in die Slowakei in die Stadt Nitra. Mein persönlicher Hintergedanke: Werbung machen! Mir sind keine aktuellen Produktionen exklusiv in Esperanto bekannt, schon gar nicht im Bereich der Science Fiction. Da muss es doch eine Art von (frenetischer?) Reaktion geben!?"

Andreas

Die nahe Zukunft

Barbarellas Wagen lässt die sich nähernde Zombiehorde hinter sich und rast auf der einsamen Wüstenstraße dem Horizont entgegen. Dort zeichnet sich dichter Wald ab, aus dem, selbst aus dieser Entfernung sichtbar, ein militärischer Aufklärungsturm emporragt. Die Dunkelheit verschluckt Barbarellas Fahrzeug auf der in den Wald führenden Straße. Die nun herrschende Stille wird ohne Vorzeichen von erdbebenartigen, wiederkehrenden Intervallen durchbrochen. Ein ungefähr vierzig Meter hohes Wesen lässt, während es sich durch den Wald bewegt, eine Spur der Vernichtung aus metertiefen Abdrücken und zerborstenen Tannen zurück. Die Kreatur ist … aus: „Epizodo III: Fuĝo“

EINE SCHRECKLICHE … NOCH NICHT GESEHENE … GEISTESKRANKE … VERGEWALTIGUNG VON NATURGESETZEN! aus: „Atako de la Mortonuboj!“

Rückblick Jesko I

Irgendwann sagte Andi dann so sinngemäß:

„Alter, dieses Esperanto, das du da immer quackelst … Lass uns doch mal Bildungsurlaub machen und zu so einem Esperanto-Treffen fahren.“ „Bist du sicher?“

„Na klar!“

„Wirklich? Du? Und ich? Auf einem Esperanto-Treffen?“

„Natürlich! Wieso denn nicht?“

„Na ja, nun. Du sprichst doch gar kein Esperanto …“

„Lern ich da! Und wir können denen den Film zeigen! Wird bestimmt super!“ „Naaa schön …“

Sommer 2014 SES in der Slowakei

„Die einzige Frage, als ich mich endlich traue zu erwähnen, dass wir eine EIGENE(!) SERIE(!!) IN ESPERANTO(!!!) gedreht haben, lautet: ‚Wer hat euch die Übersetzung gemacht?‘“ Andreas

„Irgendwo im Weltraum … könnte genau dies geschehen!“ **Trailer Episode IV**

Rückblick SES 2014

„Dieser Moment ist mein persönlich erlebter Inbegriff für ‚Subkultur‘. ‚Subkultur‘, die anscheinend eine klare Abgrenzung von Mitwirkenden und Außenstehenden benötigt, um zu funktionieren.

Die Reaktion auf den Vorschlag, einen Teil der Serie beim SES 2014 auf dem Kinoabend zu zeigen, war: Leute, ich glaube, so etwas passt hier nicht … Ich habe das Gefühl, dass es als unmöglich angesehen wurde, dass jemand, der nicht Teil der aktiven(?) Esperanto-Subkultur ist (was ja bei einer Subkultur die, soweit ich das mitbekommen habe, ‚nur‘ ihre Sprache als Alleinstellungsmerkmal hat, schon schwierig ist, da ja jeder, der die Sprache spricht, per se dazu gehören müsste), trotzdem einen Beitrag leisten darf/kann“

Andreas

„Die Erde ist der einzige der Menschheit bekannte Planet, auf dem Leben existiert, doch wie lange noch?“
aus: „Epizodo I: La Okulo de la Scienco“

April 2021

„Versuche durch Versenden von E-Mails an Esperanto-bezogene Webseiten Aufmerksamkeit auf die finale(?), fünfte Episode (und damit hoffentlich die ganze Serie) zu ziehen. Eine der wenigen Antworten, die ich erhalte, ist von Michael Vrazitulis. Er bittet uns diesen Artikel zu schreiben.“

Andreas

AW: Kune Artikel – Einladung zum Bearbeiten
Von: Jesko

Ich glaube, es war genau genommen so:

> Die einzige Frage, als ich mich endlich traue zu erwähnen, dass wir eine EIGENE(!) SERIE(!) AUF ESPERANTO(!) gedreht haben, lautet: „Wer hat die Grammatik geprüft?“

… und ging dann noch (schlimmer?) weiter mit dem Hinweis: „Ich habe übrigens ein Grammatikbuch geschrieben, das ich euch empfehle.“

Rückblick SES 2014 II

„Es gab da sehr freundliche, sympathische Leute. Dennoch habe ich das, was dort ablief, sehr distanziert wahrgenommen. Es herrschte eine (auf mich) manchmal schon fast überdreht wirkende Begeisterung, die eben (so deute ich das jedenfalls) maßgeblich darauf gerichtet war, dass man sich dort als Teil der Esperanto-Bewegung trifft. Das ist zumindest meine Erklärung dafür, wie die Teilnehmer:innen an sich normale (na gut, und teilweise auch etwas skurrile) ‚Ferienaktivitäten‘ zelebrierten. Und das ist natürlich super, aber, nun ja, ich bin ja nicht Teil der Esperanto-Bewegung. Das hat zu dem seltsamen Effekt geführt, dass ich mir dort zeitweilig wie ein Betrüger vorkam, vielleicht noch verstärkt dadurch, dass ich als halbwegs gut Esperanto Sprechender wahrgenommen wurde. Vielleicht ist das einfach der berühmte ‚etoso‘; dann ist das hier eine Schilderung, wie der auf einen Außenstehenden wirkt, der sich hineinverlaufen hat. Eine Abneigung gegen die Esperanto-Bewegung habe ich überhaupt nicht. Dass es eine solche Sprachgemeinschaft gibt, ist, soweit ich weiß, einmalig, und das ist schon faszinierend. Ich glaube aber, für mich bleibt da nur die Beobachterrolle, und das ist ja auch in Ordnung.“ Jesko

Andreas Niethmann dreht und veröffentlicht seit 2012 die esperantosprachige Serie „La mortiga fuĝo tra spaco kaj tempo“ auf dem YouTube-Kanal „Horizontalfilm“. Jesko Beyer unterstützt ihn dabei, unter anderem mit der Übersetzung der Dialoge ins Esperanto. Im Frühjahr 2021 erschien die finale(?) Episode: „Zurück auf der Erde“. Der serienbegleitende Blog erscheint auf www.horizontalfilm.de. Beide besuchten 2014 das „Somera Esperanto-Studado“.

JES, JES, JES!

Michael

Das JES 2021/'22 (28.12.–04.01.) kommt nach Wittenberg! Wir haben es euch hier schon ein paar Mal angekündigt, aber einmal mehr geht immer.

Seit Juni könnt ihr euch schon anmelden, einfach schnell das Formular ausfüllen unter jes.pej.pl/jes-2021/alighu, je früher desto günstiger. Euch erwartet wie immer ein buntes Programm mit Konzerten, Exkursionen, Kursen, Vorträgen und vielem mehr.

Wie ihr dem Insta-Sharepic hier – unkonventionellerweise auf Papier abgedruckt! – entnehmen könnt, wird unter anderem ein Weltmusik-Ensemble aus dem Rhein-Main-Gebiet mit dem tre ĉarma esperantosprachigen Namen Vagabondoj exklusiv für uns auf dem JES performen.

Grupalvoka kinejeto

Michael

Ekde kiam ĉi tiu kronvirusa afero komenciĝis, ni, membroj kaj simpatiantoj de GEJ, provas resti en regula kontakto per grupaj videoalvokoj.

Lastmonate, je instigo de Annika, ni uzis tian virtualan renkontiĝon en la kutima JitSi-ĉambro meet.jit.si/DEJgrupalvoko, por kune spekti dek

esperantlingvajn mallongajn filmojn, kiuj estis kontribuoj por la ĉi-jara Usona Bona Film-Festivalo kaj premiitaj kiel la plej bonaj.

Ĉiuj dek estis ege distraj, kvankam ni multe diskutis en la grupo, ĉu la ordo, laŭ kiu ili finfine premiiĝis, estas ĝusta. La stop-motion-koncepto kaj bizare ŝerca rakonto de la unua gajninto "Persistemo" ja igis ĝin unika, sed eble filme, idee kaj estetike pli spritaj kontribuoj, kiel ekzemple la nekompreneble nur sepaloke premiita "Disiĝi", facile same aŭ eĉ pli meritintus la plej grandan premion. Sed se vi ankoraŭ ne spektis ĉiujn filmetojn, vi ĉiukaze bonvolas juĝi mem! Vi povas trovi ilin jutube sur la kanalo *EsperantoUSA*.

Inter ni, la kvaropo – intertempe kvinopo – kiu partoprenis tiun grupalvokon, finspektinte ĉiujn dek filmojn, regis la konvinko esti malkovrintaj, ke ... esperantistoj vere ŝatas kafon! Ŝajne preskaŭ en ĉiu filmeto ie aperis homo trinkanta kafon el taso. Se ni tiam sciintus, ke la kernaj kondiĉoj por kontribuoj al tiu ĉi unua eldono de la Film-Festivalo efektive estis, "ke la filmoj estu parolataj en la Internacia Lingvo kaj ke taso da kafo aperu sur la sceno", eble ni ne tiom estus surprize entuziasmiĝintaj pri ĉiu plua ie aperanta kafotaso. Sed nu...

Intertempe fakte la venonta eldono de la Film-Festivalo jam ekestas planata: Ĉi-foje la ĉeftema objekto ne plu estos la fifama taso da kafo, sed anstataŭe ĉapelo, kiel klarigas la organizanto kaj Esperantuje konata jutubisto Alex Miller en anonca filmeto, aperinta junie. Por ĉiuj



hobiaj kaj malpli hobiaj film-kreantoj kaj -kreistoj, kiuj ŝatas Esperanton, tio estas jen denova ŝanco por montri sian talenton. Eblas kontribui ĝis plej malfrue la 12-an de septembro.

Ankaŭ grupalvokoj de GEJ daŭre okazos. Kiel interkonsentite dum KEKSO, ĉiun unuan kaj ĉiun trian vendredon de monato ni renkontiĝos fruvespere je la sepa en la kutima virtuala ĉambro. La venontaj datoj do estas

– 6-a de aŭgusto, 19h00 CEST (publike anoncita kaj privarbita, por ĉiuj)

– 20-a de aŭgusto, 19h00 CEST (ĉefe por membroj kaj junuloj en Germanio)

La ekrankapta bildo de grupalvoko ĉi tie fakte ne estis farita tiufoje, kiam okazis la kinejeto, sed jam iom da semajnojn antaŭe. Ankaŭ ne ĉiam dum renkontiĝoj ni tiel strikte observas kontraŭinfekciajn mezurojn. Seeeed, iu simbolfoto bezonatas ja.

Recepto por ĉeriza "Streusel"-kuko

Annika

Ĉeriza "Streusel"-kuko

Por la gistpasto

- 300g da faruno
- 1 pakaĵo da gisto
- 45g da sukero
- 5g da vanila sukero (aŭ unu pakaĵo)
- iomete da salo
- 75g da oleo aŭ margarino
- 150ml da planta lakto

Por la ĉerizaĵo

- 1 glaso da ĉerizoj kun suko (~650g)
- 1 pakaĵo da pudingpulvero

Por la "Streusel" (kukeroj)

- 50g da oleo
- 5g da vanila sukero
- 75g da sukero
- 120g da faruno

Miksu ĉiujn ingrediencojn por la gista pasto kaj knedu ĝin dum kelkaj minutoj. Kovru ĝin kaj lasu ĝin en varma ejo dum almenaŭ unu horo, ĝis ĝi ĉirkaŭ duobliĝos.

Intertempe miksu iom de la ĉerizsuko kun la pudingpulvoro, varmigu la reston de la ĉerizoj ĝis ili bolas. Enmetu la miskaĵon kaj kirlu dum unu minuto, poste forprenu la poton de la kuirplato.

Por la kukeroj miksu la oleon, vanilan sukeron, sukeron kaj farunon kun forko, por havi pasterojn de malsama grandeco inter 0,5 kaj 2 cm.

Kiam la gistpasto pretas, metu ĝin sur bakpleton, tiel, ke ĝi havu dikecon de ĉirkaŭ 1-2 centimetroj. Metu la ĉerizaĵon sur la paston kaj aldonu la kukerojn. Baku la kukon ĉe 180°C dum ĉirkaŭ 35 minutoj.

KEKSO-kanto

Michaela

KEKSO, bei dir trifft man neue Leute
KEKSO, nur dufoje dum la jar'
KEKSO, krokodili eblas heute
KEKSO, kreativ sein wird hier wahr

KEKSO, bei dir lernt man Esperanto
KEKSO, für den Einstieg wunderbar
KEKSO, nun vi iĝas babilanto
KEKSO, por vizit' en kongresar'

Saluton karaj,

dum KEKSO ni kreis etan KEKSO-kanton. Ĝi ja havas melodion, sed vi povas esti kreemaj kaj komponi vian propran melodion por ĝi. Registru ĝin kaj sendu ĝin al ni, aŭ aliĝu al la aŭtuna KEKSO por prezenti ĝin tie!

Hallo ihr Lieben, beim KEKSO haben wir ein kleines KEKSO-Lied gedichtet. Es hat zwar schon eine Melodie, aber ihr könnt gern selbst kreativ werden und eure eigene Melodie dafür komponieren. Nehmt sie auf und schickt zu uns zu oder meldet euch zum Herbst-KEKSO an, um sie uns dort vorzustellen!

Esploru la jidan

Jan

Post ses jaroj da atendado ĝi finfine alvenis: La kurso de la jida lingvo en Duolingo.

Neniam daŭris la evoluigo de Duolongo-kurso tiom longe. La kialoj por tio estas diversaj: Sur la organiza flanko estis multaj ŝanĝoj en la teamo de kontributantoj, kaj sur la praktika flanko estis defiaj teknikaj demandoj solvendaj: Kiun dialekton oni instruu? Kiun skribmanieron oni uzu? Al kiu oni entute celu la kurson? Ĉu specife al homoj kun jida heredaĵo, aŭ ĉu al pli ĝenerala grupo?

La unuaj du demandoj estis responditaj per kompromiso: La kurso instruas per la elparolmaniero de la Ĥasida dialekto, kiu estas denaska al la plimulto de la hodiaŭa parolantaro. Tamen, kiel skribsistemo oni elektis la normigitan YIVO-ortografion. Nekutima elekto, sed ne malsaĝa! Ĉar Duolingo ĝenerale celas alparoli kiel eble plej multe da lernuntoj, la lastaj demandoj respondas sin mem.

El alia vidpunkto, el la vidpunkto de multokupata lingvolernanto, oni sin nature demandas: Kial indas investi tempon en lingvon (ŝajne) apenaŭ kaj dise parolatan? Tion mi ŝatus iom esplori, kaj mi taksos min sukcesa, se mi kapablas doni al vi inspireton mem eltrovi la diversajn facetojn de tiu lingvo.

Malfacilas diri, kiam kaj kie ekzakte la Jida lingvo estiĝis, sed la hodiaŭ plej vaste kredata teorio estas tiu, ke ĝi formiĝis en la 10-a jarcento, kiam judoj el Italio kaj Francio migris en la Rejn-valon. Tie ili intermiksis siajn kunprenitajn lingvojn kun la mezaltgermana de la novaj najbaroj. Dum la sekvaj jarcentoj, pro setlo-movadoj kaj persekutado, la lingvo disvastiĝis al orienta Eŭropo, kaj de tie ĝi migris al Usono, Israelo, Kanado kaj aliaj partoj de la mondo.

Antaŭ la dua mondmilito, proksimume 80% el la tuta juda popolo parolis la jidan lingvon, en nombroj inter 11 kaj 13 milionoj. Por doni al vi ideon kiom multe tio estas: Tio signifas, ke en tiu tempo la Jida estis - malantaŭ la angla kaj la germana – la plej vaste parolata ĝermana lingvo.

Oni facile imagas, ke tiom granda nombro da parolantoj kaŭzis grandan eligon da kulturaj produktaĵoj: dum la tiel nomata ora tempo de la jida filmo, pli ol 130 filmoj estis produktitaj, ekzistis amaso da jidaj teatroj, kaj pro Isaac Singer (1902-1991) la jida literaturo povas eĉ drapiri sin kun unu Nobel-premiito pri literaturo.

Kvankam la oraj tempoj por la jida kulturo estas for, hodiaŭ ĝi travivas renaskiĝeton: En 2017 "Menashe" estis la unua jidlingva filmo el Usono de la pasintaj 70 jaroj, kaj la grandparte jidlingva mini-serio "Unorthodox" de Netflix eĉ ricevis Emmy-premion.

Impona estas ankaŭ la laboro de Aaron Lansky, kiu en la 70-aj jaroj komencis savi alikaze forĵetitajn jidajn librojn, ja tutajn bibliotekojn. Tiom da homoj kontaktadis lin, ke li decidis dediĉi sian tutan vivon al la savado de jida literaturo kaj fondi la "Jidan Libro-Centron" (YBC). La kolektitajn librojn la YBC ciferecigas kaj havebligas, tiel ke nun pli ol 11.000 libroj povas esti legataj sur sia retpaĝo: originaj verkoj kaj ankaŭ tradukoj de ĉiuj imageblaj verkoj kiel tiuj de Shakespeare, Nietzsche, Remarque aŭ Heine.

La tradicia jida muziko jam antaŭ longe eniris la popularan kulturon pro la revivigo de "Klezmer" en la 70-aj jaroj. Artistoj kiel Daniel Kahn, Psoy Korolenko aŭ Isabel Frey evoluigas ĝin ĝis hodiaŭ per originaj kantoj kaj novaj interpretoj de klasikaĵoj. Fakte, dum la sekva JES vi havos la ŝancon sperti klezmer-koncerton de la germana grupo "Vagabondoj".

Finfine ankaŭ Esperanto iasence estas historio jida. Zamenhof, kies denaska lingvo la jida estis, verkis la "novan judan lingvon" en provo modernigi la jidan, por ke ĝi unuigu la judan popolon. Poste li abolis tiun projekton favore al Esperanto. Kvankam Esperanto ricevis relative malmulte da jidaj vortoj, ĝi naskiĝis kun jida spirito. (Duo ekparolis jide »)

Jarfina junulara seminario en Germanio

Pri blasfemado kaj insultado en internacia komparo okupiĝis la malgranda, sed efika laborgrupo de D-ro W. Schumacher. Sur la foto, de maldekstre: G. Sutton (Britio), Yashovardhan (Hindio), W. Schumacher, H. Klünder, W. Loose (FRGerm.), kaj (de malantaŭe) C. Pothuizen kaj F. de Geus (Nederlando).

Per naturkatastrofo finiĝis la 19-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Cuxhaven-Berensch: la 3-an de januaro la restintaj seminarianoj devis dum kvin minutoj forlasi la domon, kiu minacis inundiĝi pro ventego kaj tajdo.

Sed mi povas certigi, ke ĉifoje ne kulpis la estraro. Ankaŭ ne la Konstanta Komitato por tiuj Seminarioj, kiu faris ĉion por prezenti taŭgan programon kaj eviti malglatajojn. Ŝajnas nun, ke la kontinueco de iom altnivela internacia aranĝo estas retrovita, kvankam ĉiam kaj ĉie restas iuj mankoj.

La temo ĉijare estis „lingvistiko"; pri ĝi pli-malpli traktis tri prelegoj: 1. „Nuntempaj pruntvortoj en la finna" (G. Sutton); 2. „Dulingveco kaj lingva lukto en moderna Grekujo" (D-ro W. Schumacher) kaj 3. „Analizmetodoj por esplori optimecon de sonsistemo" (T. Vaskó). Iom ĉe la rando de la temo kaj ekster ĝi troviĝis du pliaj prelegoj: „Lingva diskriminacio kaj la lingvopolitiko de FRG" (D-ro W. Bormann) kaj „Sciencfikcio" de G. Silfer.

Esperanto por esperantistoj

La laborgrupoj pritraktis lingvajn problemojn iom ĝenerale. Temis pri „Esperanto por esperantistoj" (H. Trunte), „Tradukado" (B. Moon), „Kompara blasfemologio" (W. Schumacher) kaj „Lingvistiko kaj arto" (G. Silfer).

La laborgrupo de Anton Oberdorfer „Novaj vojoj de poresperanta agado" — do iusence kurso pri varbado, ktp. — trovis grandan intereson kaj aliflanke estis plej kontestata, pro la principa demando, ĉu en Internacia Seminario de GEJ estu loko por movadismo: principe ne, ĉar por tio ekzistas sufiĉe multe da aliaj okazoj. Sed tute elimini ĝin ankaŭ ne ŝajnas tiom utile, ĉar ekzistas ankaŭ inter la seminarianoj evidenta bezono interŝanĝi spertojn.

Internacia kuirkurso

Okazis fine du kursoj por diversgradaj komencantoj (gvidis P. Peeraerts kaj J. Cushing) kaj kuirkurso pri diverslandaj specialaĵojn, kiun gvidis Claude Nourmont-Moon: por ĝi la intereso estis tiel eksterordinara, ke necesis limigi la nombron da partoprenantoj. La homoj beate kuiris en la kelo dum multaj horoj ĉiutage, donante impreson de iu „sekreta klubo".

Kiel kutime, la seminario estis okazo por areto da laborkunsidoj i.a. de la estraroj de GEJ kaj TEJO, de la redakcio de „Kontakto", de la TEJO-Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER).

La tradicia silvestra balo ŝajnas al mi la plej sukcesa de la lastaj tri jaroj.

Danaj popoldancoj

Kaj fine, se iu estus farinta inter la seminarianoj enketon pri junularaj deziroj, li verŝajne tuj post manĝado, trinkado —

(fino sur p. 2, kol. 1)

La venonta numero
3 (1592)
aperos la 20-an de februaro

(la limdato por la alsendo de materialo por la posta numero, 4-5 (1493-94), aperonta la 16.III., estas la 21-a de februaro).



SALUTON
ESPERANTO
Kurs → metoda bezpośrednia
KURS ESPERANTO
CHCESZ MIEĆ PRZYJACIÓŁ NA CAŁYM ŚWIECIE? NAUCZ SIĘ Esperanto
Kamil D.
„TANIE PODRÓŻOWANIE"
POGADANSA
Centrum Edukacji Międzykulturowej
Nowy Sącz
33-300 Nowy S
Al. Wolności 37
www.cem.info

ESPERANTO
Fundacja "Dr Clown"
Anonimowi Narkomani

Hi
Hallo
SALUTON
CZEŚĆ
Hello
Salut
Hej
Bok
SVEIKI
ESPERANTO
Ahoj
Przytannie
Oi
Merhaba
Ciao
Hola
Kurs → metoda bezpośrednia

27th
Pol'and'Rock
29-31.07.2021